WIKIPEDIA

Unish

Uniŝi(Unish) estas planlingvo proponita de Universitato Sejong en Koreio la 1an de junio, 2001. Ĝi estas lingvo kiu prenas vortojn el la plej uzataj lingvoj de la mondo, ekzemple angla, rusa, hispana, kaj pliaj.

Unish	
Parolantoj	neniuj
Skribo	Latina
Kreinto	Language Research Institute, Sejong University
Lingvistika klasifiko	
Planlingvo	
Lingvaj kodoj	
Angla nomo	Unish
Opcio	Vortaro el dek kvin reprezentaj lingvoj kiel la Angla, Hispana, Portugala, Itala, Franca, Germana, Rusa, Araba, Hindia, Greka, Latina, Ĉina, Korea, Japana, kaj Esperanto.
Noto	IPA

Enhavo

Gramatiko
Alfabeto kaj prononco
Morfologio
Sintakso
Eksteraj ligiloj

Gramatiko

Alfabeto kaj prononco

Unish uzas latinan alfabeton. Malsame al Esperanto:

- J havas sonon /ĝ/;
- Q havas sonon /kŭ/;
- R havas sonon /ř/ (kiel en la angla *r*iver);
- X havas sonon /ks/;
- CH havas sonon /ĉ/;
- NG havas sonon /ŋ/;
- SH havas sonon /ŝ/;
- Y oni prononcu /j/;
- W oni prononcu /ŭ/;

Morfologio

Ne estas artikoloj.

Substantivoj havas du kazojn: nominativon kaj genitivon. La genitivon oni faras per -'s. Pluralon oni faras per -s.

Ne estas distingo de genroj en pronomoj.

Verboj ne varias laŭ nombro aŭ persono. Pasinta tempo estas farita per -ed, kaj futuro per -il. Estas helpverbo *be* (esti) por formi pasivan voĉon kaj progresan aspekton.

Sintakso

Adjektivo venas nepre antaŭ substantivoj. Adverboj venas nepre antaŭ verboj aŭ adjektivoj.

Baza vortordo estas Subjekto-Verbo-Objekto. Demandaj frazoj havas formon Verbo-Subjekto-Objekto.

Eksteraj ligiloj

- Oficiala paĝaro (http://www.unish.org) angle

Elŝutita el "https://eo.wikipedia.org/w/index.php?title=Unish&oldid=6436834"

Ĉi tiu paĝo estis lastafoje redaktita je 06:22, 10 okt. 2018.

La teksto disponeblas laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite-Samkondiĉe 3.0 Neadaptita; eble aldonaj kondiĉoj aplikeblas. Vidu la uzkondiĉojn por detaloj.